Espero
por prostituitinoj

Kaj Jesuo leviĝis, kaj diris al ŝi: Virino, kie ili estas? ĉu neniu vin kondamnis? Kaj ŝi diris: Neniu, Sinjoro. Jesuo diris al ŝi: Ankaŭ mi vin ne kondamnas; iru, kaj de nun ne plu peku. JOHANO 8:10-11

Kiam ili ankoraŭ demandis lin, li leviĝis, kaj diris al ili: Kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu sur ŝin ŝtonon. JOHANO 8:7

Mi venis, por alvoki ne justulojn, sed pekulojn al pento. LUKO 5:32

ESTAS KVAR VEROJ, KIUJN NI DEVAS PLENE KOMPRENI:

1 DIO AMAS VIN.

DIO VOLAS, KE VI HAVU ETERNAN VIVON KUN LI EN LA ĈIELO.
Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al li, ne pereu, sed havu eternan vivon. JOHANO 3:16

DIO VOLAS, KE VI HAVU ABUNDAN KAJ SENCHAVAN VIVON.
La ŝtelisto ne venas, krom por ŝteli kaj buĉi kaj pereigi; mi venis, por ke ili havu vivon, kaj havu ĝin abunde. JOHANO 10:10

TAMEN MULTAJ HOMOJ NE SPERTAS SIGNIFOPLENAN VIVON KAJ NE CERTAS PRI ETERNA VIVO ĈAR...

2 HOMO ESTAS PEKA DE NATURO. DO LI ESTAS APARTIGITA DE DIO.

Ĉar ĉiuj pekis kaj maltrafis la gloron de Dio; ROMANOJ 3:23

Ĉar la salajro de peko estas morto... ROMANOJ 6:23

• FIZIKA MORTO
Kaj kiel estas dekretite por homoj unufoje morti,
kaj post tio juĝo; HEBREOJ 9:27
• SPIRITA MORTO AŬ ETERNA DISIGO DE DIO
Sed por la timemaj kaj nekredemaj kaj abomenindaj kaj mortigistoj kaj malĉastuloj kaj sorĉistoj kaj idolanoj kaj ĉiuj mensoguloj, ilia lotaĵo estos en la lago, brulanta per fajro kaj sulfuro; tio estas la dua morto. APOKALIPSO 21:8

SE LA HOMO ESTAS APARTIGITA DE DIO PRO SIA PEKO, KIA ESTAS LA SOLVO AL ĈI TIU PROBLEMO?

NI OFTE PENSAS PRI ĈI TIUJ KIEL LA SOLVOJ:

RELIGIO, BONFAROJ, MORALO

TAMEN, EKZISTAS NUR UNU SOLVO PROVIZITA DE DIO.

3 JESUO KRISTO ESTAS LA SOLA VOJO AL LA ĈIELO.

Jesuo diris al li: Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo; neniu venas al la Patro krom per mi. JOHANO 14:6

Ĉar Kristo ankaŭ unufoje suferis pro pekoj, justulo pro maljustuloj, por ke li nin konduku al Dio; mortigite en la karno, sed vivigite en la spirito; 1 PETRO 3:18

Kiu fidas al la Filo, tiu havas eternan vivon; sed kiu ne obeas al la Filo, tiu ne vidos vivon, sed la kolero de Dio sur li restas. JOHANO 3:36

4 NI DEVAS METI NIAN FIDON AL LA SINJORO JESUO KRISTO POR NIA SAVO.

NIA SAVO ESTAS EBLIGITA PER LA GRACO DE DIO PER FIDO AL JESUO KRISTO.
Ĉar per graco vi saviĝis per fido; ne per vi mem: ĝi estas dono de Dio; ne el faroj, por ke neniu fanfaronu.
EFESANOJ 2:8-9

DIRU ĈI TIUN PREĜON AL DIO EN FIDO:
SINJORO JESUO, KORAN DANKON PRO VIA GRANDA AMO AL MI. MI KONFESAS, KE MI ESTAS PEKULO KAJ MI PETAS PARDONON. DANKON PRO MORTI SUR LA KRUCO POR PAGI LA PUNON POR MIAJ PEKOJ. MI KREDAS JE VIA RELEVIĜO EL LA MORTINTOJ. DE NUN MI FIDAS VIN KIEL MIAN SINJORON KAJ SAVANTON. MI AKCEPTAS VIA DONACO DE ETERNA VIVO KAJ MI TRANSDONAS MIAN VIVON AL VI. HELPU MIN OBEI VIAJN ORDONOJN KAJ ESTI PLAĈA EN VIA VIDO. AMEN.

SE VI KREDAS JE JESUO KRISTO, JEN OKAZIS AL VI:
• VI HAVAS ETERNAN VIVO KUN DIO.
Ĉar estas la volo de mia Patro, ke ĉiu, kiu vidas la Filon kaj kredas al li, havu eternan vivon; kaj mi levos tiun en la lasta tago. JOHANO 6:40
• ĈIUJ VIAJ PEKOJ ESTAS PARDONITAJ. (PASINTA, NUNA, ESTONTECO)
Kaj liberigis nin el la potenco de mallumo, kaj transportis nin en la regnon de la Filo de Sia amo; en kiu ni havas la elaĉeton, la pardonon de pekoj; KOLOSANOJ 1:13-14
• VI ESTAS TUTE NOVA KREITAĴO ANTAŬ DIO.
JEN LA KOMENCO DE VIA NOVA VIVO.
Tial se iu homo estas en Kristo, estas jam nova kreitaĵo; la malnovaĵoj forpasis, jen ili jam estiĝis novaj. 2 KORINTANOJ 5:17
• VI NUN ESTAS INFANO DE DIO.
Sed al ĉiuj, kiuj lin akceptis, li donis la rajton fariĝi filoj de Dio, al la kredantoj al lia nomo, JOHANO 1:12

FARI BONAJN AGOJN NE ESTAS RIMEDO AL SAVO,
SED PRUVO DE NIA SAVO.
Ĉar per graco vi saviĝis per fido; ne per vi mem: ĝi estas dono de Dio; ne el faroj, por ke neniu fanfaronu. EFESANOJ 2:8-9

Ĉi tiu broŝuro estas senpaga. Ne vendota.